

Al turno-punkt' de sun-leviĝ'

A SOLIS ORTUS CARDINE • ADORU 249

1. Al tur-no-punkt' de sun - le - viĝ'
2. Be - na - ta la Fa - rint' de l' mond'
kaj ĝis eks - tre - mo de la ter'
sin ves - tis per ĉi skla - va korp',
ni kan - tu al Princ' Kris - to: Lin
por sa - vi kar - non per la karn',
Ma - ri - a nas - kis, Vir - gu - lin'.
ke ne per - di - ĝu kre - i - tar'.

3. Ĉastegan ventron de patrin'
la graco trafas el ĉiel',
knabina ventro pro sekret'
pezegas: ŝi ne konas ĝin.
4. Do domo de pudora kor'
tuj iĝas templo nur por Di':
la ne-tuŝitulin' sen vir'
koncipas filon en uter',
5. En nasko-spasmoj naskas Lin,
kiun anoncis Gabriel' –
kaj supren-salte jam Baptist'
rekonas Lin el panja sin'.
6. Fojn' por kuŝado, kial ne?
li ne malŝatas pri manĝuj':
per iom lakto nutras sin,
dank' kiun manĝas ĉiu bird'

7. Ĝojegas ĉielula ĥor',
anĝeloj kantas nun por Di'
kaj al paŝtistoj la Paŝtist'
montriĝas: ĉies Li kreint'.

8. Jesu', la gloro jen por vi
– ĉar Vi naskiĝis el Virgin' –
kun Patro kaj Vivig-Spirit'
por ĉiam-daŭra la tempeg'.

A SOLIS ORTUS CARDINE • FROM EAST TO WEST, FROM SHORE TO
SHORE • HAM 57 • Brevier-Himno • M (O Jesu Christe, wahres Licht):
Nürnbergisches Gesangbuch 1676, Unisono 109, CG 69, GL 643, nGL85, EM
194 kaj 517 • lati-na T: Sedulius 5a jarcento • angla T: John F. Ellerton • E:
Gerrit Berveling • TK 112 (tie kun alia melodio) • 2001 en ADORU 249

↑ Luk 1,78

*La originalo same komenciĝas strofo-komence per la lite-
roj A, B, C, D, E, F, G, J. Sed ĉar en kristana latina oni
ofte prononcas la C kiel ĉ kaj la G kiel ĝ, la verkisto kredis
sin rajtigita elekti tiujn literojn.*